

HISPANA ESPERANTO


Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorieta de Bilbao, 5.

— Ju'io Mangada Rosenörn.— MADRID —

III^a
JARO

NUM. IV.—APRILIO

III^a
JARO



Mayos (Majoj) de Riglos (Huesca).

PRI ORGANIZO DE LA ENLANDA MOVADO

(Daŭrigo.)

Konstatinte kaj elpruvinte, ke Hispana Esperanto-Asocio havas la ĝustan, justan, konvenan kaj plej internacie konatan nomon, kiu samtempe estas tute plenrespektanta la diversajn regionpersonecojn, kiuj fortigas kaj gravigas la tutlandan personecon; konstatinte kaj elpruvinte, ke H. E. A. akceptas tute frate kaj samrajte samideanojn de la tuta lando dezirantajn akceli la triumfon de esperanto ĉe la plej pure, neŭtrala laboro al tiu celo kaj aperi grandamase antaŭ la Registaro kaj la publiko por impresi unu kaj alian kaj ĉi tiujn konvinki pri utilo de esperanto; konstatinte kaj elpruvinte, ke H. E. A. lasas siajn membrojn en plena libereco al ago laŭ propra memdecido por stari ĉe la esperanta kampo ĉu izole, ĉu are, kvankam rekomendas kaj favoras ĉiajn arigojn (la Kongreso de Sevilla rekomendis starigi grupon laŭ la leĝo ĉie, kie estu *dek* samideanoj), sed neniel postulante kaj malpli altrudante; konstatinte kaj elpruvinte, ke H. E. A., spite de ĉio, progresas kaj interesas ĉu la Registaron, ĉu la publikon, kaj neniel baras la dezirojn de la samideanoj al fondo de lokaj kaj regionaj aroj, sed male, helpas tiajn fondojn, kaj simpatias al ili, *mi firme kredas, ke la nuna regularo tute bone satigas la celon de la Asocio, kaj ke ĝi nur bezonas detaligi pli iujn aĵojn por eviti danĝerajn interpretojn pri absoluta sendependeco ĉe aferoj de la Asocio*. Leĝe, evidente estas, ke nia konciza regularo plenumas ĉiajn necesojn, ĉar alimaniere la Ĝenerala Polica Direkcio ne estus aprobinta ĝin. La regularo estas tiel ampleksa, tiel plenrespektema al ĉiaj opinioj kaj deziroj (kompreneble ĉe la plej absoluta politika socia kaj religia neŭtraleco), kiel la Kongreso de Oviedo elpruvis, voĉdonante por ke la grupo «Frateco» de Zaragoza, kies animo estas s-ro Maynar (laŭ paroloj de ĉi tiu s-ro.), planu novan organizon de la tutlanda movado, esplorante opiniojn ĉies (ĉu membroj, ĉu ne membroj de H. E. A.), kvankam ĉi tiu s-ro diversfoje parole kaj skribe sin elmontris tute malamiko de la nuna organizo; kaj jen, do, kiamaniere eraras tiuj, kiuj parolas pri diktatoraj kondutoj. Kaj tial ke mi sciis oni ekfaris la esploron aŭ propagandon pri la plano de «Frateco», estas konvene fari klarigojn por ke la membroj de nia Asocio juĝu

senpartie, gvidate nur de la bono al nia afero, kaj antaŭ ol ion ajn alian ili sciuj, ke la grupo «Frateco» estas morale tiu, kiu malpli rajtas prezenti planon, *ĉar el ĝi nur kvin membroj apartenas al nia Asocio*, kaj kvankam ĝia opinio estas respektinda, pri aferoj de la Asocio pli respektinda estas la opinio kaj pli granda estas la rajto de la grupo de Córdoba kun dudek kvin membroj en H. E. A., kaj kiu naskis la nunan regularon; la entuziasma ĉiel laŭdinda grupo de Baracaldo kun kvindek membroj en H. E. A.; la grupo de Valencia, kun dudek kvin membroj en H. E. A., la grupo «Zaragoza» Esperantista, kun dudek membroj en H. E. A. kvankam ĝi estas fondita dum la ĵus pasinta jaro, k. c.

Ĉar mi scias, ke tiu eklaboro prezentas al la samideanaro de H. E. A. tre allogantan argumenton: *altiri per la nova organizo la Katalunan samideanaron*, tre ĝustatempe kaj konvene estas konigi iujn faktojn por ke la samideanoj tute bone taksu la argumenton:

1.^e Certe la influo de s-ro Maynar estas tute pli potenca al la grupanoj de «Frateco» mem, ol al la katalunoj, *kaj se lia influo ne sukcesis aligi al H. E. A. pli ol kvin liajn samgupojn, kial kaj kiel li sukcesos rilate al la katalunaj samideanoj?* Mi opinias, ke, antaŭ ol aliformigi organismon, estas necese ĝin fortigi por ke la organismo ne pereu pro la aliformigo, kaj ŝajnas ekzisti *deziro ies* por ke en Hispanujo ne staru firma organizaĵo, celante faligi tiun, kiun ni nun havas, kiu kreskas, kiu efikas, kiun ni devas fortigi per varbado de adeptoj, por ke, kiam ĝi estu multenombra kaj tute maturaĝa, ĝi, sen risko al pereado, decidu, se necese, sian ŝanĝon aŭ aliformigon. La unua organizaĵo, Hispana Societo por Propagando de Esperanto, fondita de la entuziasmaj kaj tiam viglegaj samideanoj de Valencia (1903), ricevis mortbaton, kiam, petinte por la samideanoj de Barcelona la organizon de V^a Universala Kongreso al la tiama Centra Organizaĵo de la Tutmonda Movado, preferinte Barcelona'n kaj ne San Sebastian (kies samideanoj, tiam viglaj kaj multenombraj, ankaŭ petis la organizon), kaj sufiĉe sukcesinta la Kongreso spite de la nomata «sangelsanta semajno» (1909), iuj katalunaj samideanoj, konsciante utilon de la esperanto-movado al speciala regiona politiko kaj dezirante profiti la utilon al sia regiona celo, profitante la ĝeneralan entuzias-

mon, la sukceson kaj frukton de la Kongreso kaj la grandan katalunan esperanto-movadon, apartigis de la Hispana Societo por Propagando de Esperanto la katalunan samideanaron por fondi la fortan kaj viglan Katalunan Esp-Federacion (K. E. F.) anstataŭ preni sur sin pro sia kapableco, entuziasmo, forto, iniciativo, k. t. p., la gvidadon, prosperigon kaj triumfon de la tutlanda Societo. Poste, mortinte K. E. F. pro la milito same, kiel aliaj Federacioj, unuiginte la Federacio «Zamenhof» (fondita de mi je 1917) ĉiujn restintajn grupojn kaj izolulojn kaj liginte ĉiujn per la gazeto «Hispana Esperantisto» (ankaŭ de mi fondita je tiu dato), la grupo «Fajro» de Barcelona okazigis nian unuan Kongreson kun la celo al tutlanda organizaĵo (1920 - junio), kaj «Fajro» sukcesis *spite de la deziro ies*, kaj des pli sukcesis, ĉar la laboro atingis revivigi la Katalunan Esp-Federacion; sekvis la dua Kongreso en Zaragoza (1921), *kaj ankaŭ ĉi tie volis deziro ies frakasi la laboron*. Bedaŭrinde por la iniciativo de «Fajro», mi je la fino de 1922 estis devigata aliri al Maroko, kaj mi ne povis daŭrigi la aperigon de «Hispana Esperantisto» pro la milito, kiu ne lasis al mi liberan tempon por ĝi, kaj tial ĝi kaj la Federacio «Zamenhof» mortis, malaperante tiel la bazon kaj ligilon, kiuj estis firma apogo por la ideo naskita de «Fajro», ĉar same en Barcelona kiel en Zaragoza *deziro ies* malsukcesis dank' al mi (facile ĉi tion mi povas elpruvi per dokumentoj kaj per delegitoj kaj personoj, kiuj partoprenis ambaŭ Kongresojn). Post la Kongreso de Zaragoza, okazis tiu de Valencia, kiun ne ĉeestis la «Fajranoj» kaj mi, sed jes *la deziro ies*, kaj ĉi Kongreso decidis tutlandan organizaĵon gvidate verŝajne de la plej granda bondeziro por ĝin stariĝi en la Kongreso de Bilbao. Mi konstatas, ke mi ankaŭ sendis proponon pri organizo al Valencia, gvidate de mia sperto en Hispanujo kaj en la Universalaj Kongresoj pri *deziro ies*, kaj pri kiu nenion diris al mi de Valencia (ĉu ĝin akceptis, diskutis, rifuzis k. t. p.), ĉar pro la milito mi ne povis ĉeesti la Kongreson (1923). Al la Kongreso de Bilbao (1924) mi aliris kaj mi sciis, ke K. E. F. rifuzis partopreni la Kongreson kaj aliĝi al la organizaĵo decidita de la Kongreso de Valencia, *ĉar ĝi* (K. E. F.) *estis akceptata kiel NACIA SOCIETO* en la Konstanta Reprezentantaro de la Tutmonda Esper-Movado laŭ *deziro kaj celo ies*. Elpruvite, do, estas kiuj ĉiam deflankiĝis de la tutland

ganizaĵo, kaj konstatite estas de la sperto, ke la ceteraj hispanoj ne atentis pli ol organizaĵon kies pordoj estu ĉiam malfermataj same al ĉiuj;

II.^e Ĉar ni havas jam la organizaĵon kaj ĉi ties pordoj estas malfermataj al ĉiuj samegale, venu al ĝi tiuj, kiuj volu, ĉar en la esperanto-movado ĉio dependas de la libervolo kaj la plej reciproka respekto estas deviga al ĉiuj ĉe tute absolute neŭtrala esperanto-laboro. Tial, jen membroj de H. E. A. viglaj kompetentaj samideanoj katalunaj, eĉ apartenantaj al la Komitato direktanta K E F'n, kiel s-roj Jozefo Anglada, Francisco Gorgues, Angel Valdepeñas, k-c., Kial ne imitas tiujn ĉi la ceteraj katalunaj samideanoj? Ĉu ili timas, ke H. E. A. absorbu kaj mortigu K. E. F.n? Neniel tion ĉi ili pensu, ĉar nia tutlanda Asocio lasas kompletan liberecon al regionaj eĉ lokaj aroj, vidante plengoje forton kaj laboron ĉies kaj helpante al tio ĉiel laŭ eblo.

III.^e Kiam mi sciis pri la reorganizo de K. E. F. kaj reapero de «Kataluna Esperantisto», gvidate de deziro al unuiĝo, spertinte pri la postuloj koncernataj de gazeteldono, konsciante ke kunagado, unuiĝo de monrimedoj kaj konkordo al nia neŭtrala celo, alportos al la enlanda movado grandan forton, potencon mirigantan certe la tutmondan esperantistaron, mi min turnis al nia kunsocietano s-ro Anglada, farante proponon por aperigi solan gazeton, cedante mian, konsentante ŝanĝon de nomo, proponante senpage al K. E. F. ok paĝojn por ĝia teksto esperanto-kataluna, eĉ pliajn paĝojn se necese kun tute absoluta sendependeco por la redaktado kaj plena rajto por la enprezo, celante tiel al granda interesa sola organo de la tutlanda esperantistaro, por kiu mi nur estos kunlaboranto, kaj kiu iom post iom pligraviĝos kaj eĉ estos senpaga por la enlandaj samideanoj, laŭ plano tute reala. Sed la katalunaj samideanoj opiniis preferinde reapertigi modeste la ĉiam bonegan gazeton «Kataluna Esperantisto». Ĉi tio elpruvas, ke ni ne estas baro al unuiĝo, al alcentrigo de klopodoj; ke ni celas la unuiĝon kaj alcentrigon sed varian, por ke memstare povu ĉiu regiono aperi laŭ propra volo ĉe la unuiĝo;

IV.^e Nia deirpunkto al tutlanda organizaĵo estas logika: la individuo; nia rezultantaĵo, la tutlanda unuiĝo respektanta la individuojn pri lokaj, regionaj, profesiaj, k. t. p., organizcelo. La deirpunkto de s-ro Maynar estas la regiona federacio al tutlan-

da unuiĝo, kaj mi demandas: ĉu li konsideras la federacion deviga? Kio estos ĉe regionoj, kie la regionemeco ne estas enradikigita sento? Kio estos ĉe regionoj, kie apenaŭ estas esperantistoj? Kio estos al samideanoj dezirantaj resti izolaj, sendependaj koncerne lokajn kaj regionajn arojn? Kio estos se regiona aro ne volus arigi al tutlanda aro? Ĉiuj ĉi demandoj estas realaj, kaj tial ke en esperantujo nenio estas deviga, jen kial la projekto deiranta de la federacio ne estas praktika nuntempe almenaŭ; male, la nuna organizaĵo respondas praktike ĉiujn demandojn kaj solvas ĉiujn problemojn koncernatajn de la demandoj. Sed plie; ĉefa afero ĉie estas ekzistado de esperantistoj, car federacioj nome, papere aŭ pense starantaj estas ludo, kaj ĉi tie mi reproduktas la parolojn de la tre kompetenta vaska pioniro s-ro Víctor O de Allende, kiujn li diris sin turnante al ankaŭ kompetenta kataluna pioniro s-ro Juan Gili Norta, dum la Kongreso de Zaragoza, kiam oni diskutadis pri projekto sama, kia estas tia de s-ro Maynar: «Konsciu kaj konvínkiĝu, amiko Gili, por starigi Konfederacion, unue estas nepre necese staru **VERAJ FEDERACIOJ**;»

V.^e La konsisto el la nuna Komitato de nia H. E. A. estas kopio de la proponata kaj decidata de la Kongreso de Bilbao konscianta la neceson de estraro en Madrid por konstanta kontakto kun la Registaro, kaj s-ro Maynar tiel voĉdonis; nun li ne opinias same: li plendas ĉar la komitatanoj ne kunvenas plene, nur la madridaj, kiuj interkonsiliĝas, decidis kaj ne ĉiam transigas la opiniojn por aprobo, modifo aŭ malaprobo, al regionaj voĉdonantoj (laŭ liaj paroloj mem), kaj kiuj ne plenumas la devojn laŭ la regularo. Mi demandas: kiel kunvenigi eĉ unu fojon jare la Komitaton venigante al Madrido la Komitatanojn? Konsciante la neeblecon, la Kongreso de Bilbao decidis tiel dirite; kaj se malfacile estas tion atingi al centra loko, kiel tion atingi se la Komitato devus kunveni ĉe loko elcentrigita? La Kongresoj solvas tion, kaj tamen la Kongresoj ne kunvenigas la plej grandan parton el la Komitato. Pri neplenumado de la regularo, mi scias kulpigojn ne pravajn de s-ro Maynar, eble, tamen estos kulpoj, ĉar la homoj ne estas perfektaj, kaj tiaj ĉiuj pekas; sed se estus pekoj de la centraj komitatanoj, la pekoj ne baris nian progreson, ne malŝparis la monon de nia kaso, ne malsukcesigis iel la disvolvigadon de H. E. A., tute kontraŭe oka-


zis; kaj unue la Kongreso de Sevilla, dankante unuanime kaj reelektante same la Komitaton, poste la regionaj komitatanoj (s-ro Maynar mem en ambaŭ okazoj) ne akceptante la eksigon de la Sekretario kaj laŭdante lian laboron, malaperigis absolute kian ajn malgrandan pekon, ĉar estas pekoj, kiujn oni ne devas atenti, ekzemple: la Kongreson de Sevilla decidis, ke la dokumentoj pri ĉiu Kongreso estu sendataj al la Sekretariejo de H. E. A. por starigi la arĥivon, kaj ankoraŭ s-ro Maynar ne plenumis la decidon koncerne la Kongreson de Zaragoza; en la Kongreso de Sevilla ankaŭ, pro neĉeesto de F-ino Maria Franco, kiu havis postenon ĉe la Kongresestraro, unuanime oni voĉdonis F-inon. Sara Maynar por anstataŭi tiun, kvankam F-ino. Maynar ne apartenis al H. E. A. kaj la aparteno estas nepra kondiĉo al tiaj postenoj, sed oni ne atentis la regularon pro ĝentileco kaj atestimo al la patro kaj la neatento aŭ nepleno de la regularo ne malsukcesigis la Kongreson. S-ro Maynar ĵus sin turnis al la samideanaro per cirkulero, kaj mi demandas: ĉu li tion faris nur kiel membro de H. E. A. aŭ kiel komitatano? Ĉu li tion faris kiel membro, li tion ĉi devis klarigi de la unua paragrafo, por eviti aljuĝi al la cirkulero specialan pli gravan karakteron; li, do, pekis. Ĉu li tion faris kiel komitatano, li ankaŭ pekis ĉar li reprezentas samideanojn, kies opiniojn pri la aferoj pritraktitaj de la cirkulero li ne petis; li, do, ankaŭ pekis. Tute same li pekis pri la akcepto aŭ ne akcepto de la eksigo de la prezidanto de H. E. A. (s-ro Vicente Alonso) ĉar li ne petis opiniojn al ĉiujn siaj reprezentatoj.

J. M. R.

Rimarko.—Dum ĉi tiu artikolo atendis la ĝustatempan okazon por aperi, okazis feliĉe interrilatoj al aliĝo de K E F al nia Asocio; kaj jen, do, kiamaniere tute nature kaj logike H E A sin kondukas kaj agas, reelpruvante sian taŭgecon.

NE SUFIĈAS PREDIKI

Jes, ne sufiĉas prediki, estas necese doni tritikon: ĉar s-ro Maynar predikas ĉe H. E. A., li estas devigata doni la tritikon, la frukton. *Ci tiu estas membroj al H. E. A., kiujn*



Cámbro nomata «Sonorilo de Huesca». - Urbestrejo (Huesca).

s-ro Maynar ne aligis, apenaŭ *nek dekon li varbis por la Asocio*, kiun obstine kaj sisteme li atakas de la fondo en Cordoba ĝis la nuntempo, kaj li mem, per siaj paroloj kaj skribaĵo (presaĵo), elpruvas la sisteman atakadon, dirante, ke oni venkis lin en Cordoba, ke en la Kongreso de Madrid li voĉdonis la nunan regularon por frakasi la provizoran de Cordoba, agente tiel ke li timigis la Sekretarion de la Loka Org. Komitato por la Kongreso de Sevilla, kie li povis fari nenion, ĉar la Kongresa atmosfero ne estis favora al li, pro kio li sumiĝis al la Kongresanaro unuanime dankanta kaj reelektanta la Komitaton de H. E. A., kvankam certe li voĉdonis kontraŭ sia opinio kaj memvolo, ĉar tute sekve de la Kongreso, li eldonis cirkuleron, atakante la Komitaton, kiun ĵus li dankesprimis kaj reelektis, elpruvante la sisteman atakon, redirante, ke *li iam triumfos*, t. e., *lia opinio kontraŭ tiu de la plejmulto ĉiam sukcesanta*. Ankaŭ tritiko aŭ frukto estas prezenti veraĵojn, por ke interese-muloj formu klaran opinion, kaj tial ke s-ro Maynar sin returnis ĵus per dua cirkulero al la samideanaro, aludante la unuan pri la enlanda esperanto-movado kaj dirante estis multaj samideanoj aprobantaj *lian absolutan vidpunktaron aŭ plejmulton el liaj vidpunktoj*, kaj citante s-rojn Vicente Alonso, Vicente Inglada, Andrés Piñó, Francisco Gorgues, Delfin Dalmau (ne apartenanta al H. E. A.!), Eugenio Lunate, Antonio Jiménez Mora, Nicolás de Pablo, Fernando Soler, Narciso Bofill kaj Francisco Azorín, ankaŭ aludante min diversfoje, mi decidis respondi per ĉi tiu artikolo dirante:

I.^e Mi estas tute certa, ke s-ro Maynar tro ĝeneraligas kaj tial eraras, ĉar mi scias, ke iuj el la aluditoj ne povas konsenti same, kiel jesas s-ro Maynar, ĉar mi parolis kun ili, ĉar lia unua cirkulero estas plena de eraroj, pro kio mi ĝustatempe pitraktados tiun cirkuleron, vidigante la erarojn por elpruvi ĝian malfirman fundamenton;

II.^e Mia tezo pri organizo de la enlanda esperanto-movado estas tia, kia jam estis en Cordoba (eĉ pli frue, sufiĉe pli frue), kaj diferenciĝas de la tezo de s-ro Maynar laŭ estas antaŭe dirite (IV.^a fakto de la antaŭa artikolo), *kiel mi rimarkigis diversfoje al s-ro Maynar dum la Kongreso de Oviedo*;

III.^e Pro foresto de s-ro Maynar, retirinte ĉiujn miajn proponojn kaj tiujn de la samideanoj de Gijón rajtigintaj min, ĉar

de la komenco de la Kongreso vidiĝis tute klare kontraŭstaranta sintenado de s-ro Maynar kaj Jiménez Mora, kaj mi deziris forigi ĉian apogon al sistema diskutado, mi petis parolon kaj apogis la proponon de s-ro Maynar, celante eviti la sisteman bataladon, ĉar fine la esperanta hispana popolo estos decidonta. Kaj mi konstatas la sistemecon de s-ro Maynar de Cordoba al Oviedo, tra Madrid kaj Sevilla (ĉar de tiam li atakadas la nunan organizon), per nova argumento: li celas per atako al personoj de la Komitato (centra parto) faligi la organizaĵon por kiu li preparas projekton, anstataŭ devigi la personojn plenumi la regularon por la bona ordo kaj funkciado de la organizaĵo; kaj estas mirinde, ke s-ro Maynar, sufiĉe malnova esperantisto, ankoraŭ ne sukcesis starigi fortan, multenombrian regionan organizaĵon, nek li sukcesis fortigi la nunan tutlandan per granda nombro da siaj samregionanoj, kaj celas starigi tre potencon tutlandan organizaĵon novan;

IV.^e S-ro Maynar, laŭ propra konfeso diversokaza, havas malbonan memoron, kaj tiel li vidigas per siaj diroj de la dua cirkulero pitraktantaj miajn parolojn al li, kiam ni eliris kune el la Ateneo de Oviedo: tiam mi diris same, kiel diras la antaŭa artikolo kaj kiel mi rekonstatas, kaj tial miaj ĝustaj paroloj al li estas: «Mi kredas, ke la nunaj statutoj, regantaj nin, taŭgas por nia sukceso.» Plie, mi ĉiam *pensis laŭte*, ĉar ĉiuokaze dum mia vivo kaj pri ĉio, *pensi tiel kaj klare esprimi la penson estis mia ĉefa karakterizo*, kvankam ĉi tiu kutimo mia alportis al mi grandajn malagrablaĵojn;

V.^e Ĉar oni devas doni tritikon (veron) por semi kaj rikolti, mi konstatas, ke mia broŝuro «*Algo sobre el movimiento esperantista español*» firme staras spite de ĉio, kiun ne bone atentis s-ro Maynar, ĉar alimaniere, li ne estus erarinta tiel, kiel li eraris per la 1^a cirkulero. (Mi deponis en la Sekretariejo de H. E. A. la supermezurantajn ekzemplerojn, pro kiō ĉiu grupo devas peti ekzempleron, ĉar ĝi estas konvena al ĉiuj por formi opinion. Mi volas konstati ĉi tie, ke kompetentaj samideanoj, bonaj miaj amikoj, ne aprobis la *publikigon*, timante naskon de danĝeroj al nia movado, same kiel ne aprobis miajn cirkulerojn pro eble danĝero influo malsukcesanta la progreson de esperanto, *sed tute ne la unuan kaj la duajn ili malaprobis pro ilia teksto*;

VI.^e Mi ne bezonas citi nomojn de personoj por pravigi miajn argumentojn, sufiĉas ke mia aludita verko firme staras, ke mi argumentas per faktoj, agoj, dokumentoj, k. t. p., konstateblaj, kaj tial mi ne riskas alproprigi al mi opinion ies sentuta fundamento.

Fine, nun; la vivo estas batalo, kaj de ĉi tiu batalado al plej forta unuiĝo de la hispanaj samideanoj nur estas esperinda, esperebla kaj nepre sukcesanta progreso de esperanto.

J. M. R.

PRI TUTMONDA NOVORGANIZO

Jen tute konkreta mia opinio: ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo unuiĝos, starigante absolute neŭtralan tutmondan organizaĵon por triumfi esperanton; ĉiu esperantisto pagos ĉiujare nur kotizon da *unu* sv. fr.; Centra Komitato direktos la organizaĵon, kaj por plej efika laboro ĉi Komitato havos pagatan ĝeneralan sekretario, kiu rajtos opinii pri la aferoj de la organizaĵo sed ne voĉdoni, ankaŭ havos pagatajn nepre necesajn oficistojn, kiuj ne rajtos oficiale opinii kaj malpli voĉdoni.

Ĉar la Esperanto-Akademio atentas la evoluon kaj disvastigon de la lingvo kaj samtempe la deflankigon de kiaj ajn danĝeroj al disfalo de nia afero, ĝi devas partopreni la gvidadon de la organizaĵo, pro kio triono el la Centraj Komitatanoj estos el la Akademio, kaj nepre pro propra rajto al tiu triono apartenos ĝia prezidanto kaj vicprezidanto, kaj la ceteron de la triono elektos la Lingvo Komitatanoj. Atentu bone, ke la Lingvo-Komitatanoj estas proponitaj al la Akademio de la diversaj naciaj samideanaroj, konsiderante ilin fidinduloj, kaj tial certe ne estos refuto al la partopreno esprimita. La aliajn du trionojn elektos la esperanta popolo, sed neniu nacio povos havi en la Centra Komitato pli ol unu membron.

La kaso de la organizaĵo liveros la necesajn monrimedojn al la Akademio por atenti la teknikajn laborojn pri vortaroj, por eldoni ĉi tiujn kaj gazeton tian, kia estis «La Revuo», ĉar ĉio, ĉi efike akcelos nian aferon; ankaŭ liveros la necesajn monrimedojn por la organizo de la Universalaj Kongresoj interkonsen-

fante kun la Loka Organizanta Komitato laŭ kondiĉoj kaj ĉir-konstancoj evitontaj deficiton en la Kongreskaso, kaj enspezante la rezultintan profiton. Se konvene estus, oni organizus internaciajn konferencojn kondiĉe ke la kaso de la organizaĵo perdus nenion.

La organizaĵo starigos tute intiman rilaton kun la neŭtralaj enlandaj organizaĵoj, kiuj klopodos aligi ĉiujn siajn membrojn al tiu, sed permesante ilian tute aŭtonoman ekzistadon; ankaŭ starigos la plej bonan rilaton *nur pri la komuna celo: triumfigi esperanton*, kun la diversaj universalaj organizaĵoj, kiuj tute memstare ĉe siaj agadkampoj bonege helpas la aferon.

Julio Mangada Rosenörn.

PROYECTO DE NUEVA ORGANIZACIÓN ESPERANTISTA NACIONAL

Puesto que este asunto se encomendó al Grupo «Frateco» de Zaragoza, según conclusión del Congreso de Oviedo, dejando aparte el largo preámbulo que antecede a los Estatutos, en el que se citan numerosos documentos y se afirma haber examinado y ponderado con minuciosidad dichos documentos, creemos conveniente publicar el proyecto, para que los miembros de H. E. A. lo pongan en parangón con los actuales Estatutos y vayan formando sus opiniones:

PROYECTO.

I. La Sociedad Esperantista Española (H. E. A.), que en lo sucesivo se denominará «Confederación Esperantista», tiene por objeto procurar, por todos los medios lícitos y posibles, la difusión y utilización en España del idioma auxiliar internacional creado por el Doctor Zamenhof y conocido con el nombre de Esperanto, sirviendo de lazo de unión entre las autónomas Federaciones esperantistas regionales de España; favoreciendo la cooperación de unas y otras en su común ideal; y representando a la colectividad, por ellas formada, en sus relaciones con las Autoridades, Entidades y particulares, esperantistas o no, dentro y fuera de nuestra patria.

II. Se procurará que cada año se celebre un Congreso Nacional, al que podrán asistir, con voz y voto, todos los españoles adheridos al mismo, sean o no socios de la Confederación.

El Congreso formulará sus conclusiones, que serán sometidas a la resolución de la Asamblea de Delegados.

III. Los socios de número se dividen, al solo efecto de sus cuotas, en las siguientes clases:

1.^a *Federados*, es decir, miembros de número de Grupos locales que, a su vez (los Grupos), pertenecen a su Federación regional. Pagarán, por conducto de la Federación, cincuenta céntimos de peseta cada cuatrimestre;

2.^a *Agrupados*, es decir, miembros de número de Grupos locales no pertenecientes a su Federación regional. Pagarán, por conducto de su Grupo, UNA peseta cada cuatrimestre;

3.^a *Libres*, es decir, no pertenecientes a Grupo alguno. Pagarán directamente DOS pesetas cada cuatrimestre.

IV. El gobierno y administración de la Confederación corresponde al Comité central, pero con sujeción a los soberanos acuerdos de la Asamblea de Delegados.

V. El Comité central estará integrado por el Presidente, el Secretario y el Tesorero de la Federación a que por turno anual corresponda, quienes serán durante ese año Presidente, Tesorero y Secretario, respectivamente, de la Confederación, más los Presidentes de las demás Federaciones regionales, que actuarán como Vocales.

VI. La Asamblea de Delegados estará integrada:

- a) Por el Comité central;
- b) Por los Delegados de las Federaciones confederadas, que podrán designar un Delegado por cada veinticinco de sus asociados federativos;
- c) Por los Delegados de los Grupos no federados, que podrán designar un Delegado por cada veinticinco de sus asociados agrupados;
- d) Y por cuatro Delegados del Congreso nacional, elegidos en el mismo.

Las fracciones menores de veinticinco asociados de cada Federación o de cada Grupo no se computarán para la designación de Delegados.

VII. La Asamblea de Delegados se reunirá por lo menos una vez al año, el primer domingo del mes de junio, y resolverá acerca de las propuestas de cualquiera de los Delegados, del Comité central y del Congreso nacional.

VIII. El Presidente de la Confederación cuidará de la ejecución de los acuerdos de la Asamblea nacional y del Comité central, y si transcurrido un mes desde la fecha de algún acuerdo, éste no se hubiese ejecutado, cualquiera de los miembros del Comité central podrá, enarbolando la bandera de la Confederación, convocar al Comité central, para proceder a la ejecución, salvo que las dos terceras partes de los miembros del tan repetido Comité central hubieren votado su suspensión; pero en tal caso se volverá a someter el asunto a resolución de la primera sesión que, en su respectivo caso, celebren la Asamblea o el Comité, y estos segundos acuerdos no podrán ser suspendidos.

IX. El esperanto y el español son los únicos idiomas que podrá usar la Confederación en sus relaciones interiores. Para los no esperantistas podrá emplearse cualquier lengua nacional o extranjera, según aconseje lógicamente el momento, pero en todo caso solamente con el previo y especial permiso del Presidente.

X. La Asamblea de Delegados y el Comité central tomarán los acuerdos necesarios para la reglamentación del funcionamiento de tales organismos y de la Presidencia, Secretaría y Tesorería.

XI. El «Instituto Nacional de Esperanto», organismo técnico de la Confederación Esperantista Española, funcionará autónomamente, con sujeción al Reglamento que, previa la necesaria deliberación, aprobará la Asamblea de Delegados.

XII. La reforma de estos Estatutos corresponde a la Asamblea de Delegados, convocada especialmente con tal objeto, y sólo tendrá lugar si obtiene un número de votos de Delegados asistentes que sea mayoría absoluta de miembros de la misma.

XIII. En caso de disolución, el haber líquido de la Confederación se entregará al Ministerio de Instrucción, para que lo invierta en el reparto de Gramáticas de Esperanto en las Escuelas nacionales.



Reliefo de Tombo. Monasterio S. Pedro (Huesca).

LA ĈI TIE APERANTAJ BILDOJ

En la nuna instituto de Huesca, tre malnova palaco, kaj iam Sertoria Universitato estas ĉambro al kiu la tradicio aljuĝas teruraĵon, pro kio oni ĝin alnomas «Sonorilo de Huesca». Jen tradicio kun historiaĵoj: Alfonso I.^a, aragona reĝo, testamentis sian tronon al la Kavaliroj de l' Templo, al la Kavaliroj Hospitalistoj kaj al Kavaliroj de la Sankta Tombo; sed aragonanoj, kunsidinte en Borja (Borĥa), je 1131, proponis entronigi la fraton de la mortinto, pro klamante *Doñ Ramiro'n* reĝo, kvankam li estis monaĥo ĉe *San Ponce de Tomeras* apud Narbono, kaj tial li rifuzis unue. La akcepto naskis malkontenton ĉe la Kavaliroj, kaj estis grandaj malhelpoj al regado de la eksmonaĥo, kiun la nobelularo alnomis tial moke «*Monaĥo*».

Intrigoj, komplotoj, ribeloj kaj malhelpadoj de la nobeluloj, embarasis la bonkoran reĝon kaj eĉ konfuzis lin, ne sciante kion fari, pro kio li decidis sin turni al la abato de sia monaĥejo petante konsilon.

La kuriero esprimis al li la reĝan peton kaj klarigis la staton de la lando kaj de la aferoj. La abato aŭskultadis atenteme kaj, kiam la kuriero finis, prenis vergeton eniris en ĝardenon, signinte per gesto por ke la kuriero sekvu lin, kaj la monaĥestro ekeltranĉis per vergetbatoj plej altkreskajn belajn florojn, kaj poste per gesto adiaŭis la kurieron.

Reveninte ĉi tiu al la palaco estis demandata de la reĝo, kiu sciis nur la agon de la abato.

Post kelkaj tagoj, la reĝo invitis nobelulojn por vidi sonorilon kies sonorajn oni aŭdos de tre malproksime.

La reĝo alvenigis la plej ribelemajn nobelulojn al la palaco, kaj en la fama ĉambro de la bildo, ekzekutisto senkapigis ilin, kaj metis la kapojn laŭ sonorila formo. La legendo diras, ke, rimarkinte manki la batilo, episkopo tre ribelema diris antaŭ la reĝo kaj nobeloj:

«Sed sonorbatilon ĝi ne havos»

— «Tial, vian la buĉisto hakos!» —

ekkriis la reĝo, kaj tuj la episkopa kapo rulis planken por okupis lokon en la sonorilo. De tiam la regado eniris plej bonan vojon.

La monaĥejo Sankta Petro en Huesca estas plenrimarkinda juvelo el la romana stilo; ĝi entenas multenombrajn artaĵojn kaj unu el ili estas la reliefo ĉi tie aperanta.

Proksime de Huesca, irante en la Pireneon, alteniĝas kvazaŭ kolonegoj el ruĝa konglomerato (el argilo kaj ŝtonoj), kiujn formis Naturo dum miljara laborado per atmosferaj agantoj. La nomo *Majoj* devenas de kutimo alnomi mastojn florumitajn por ilin grimpi dum magaj festoj.

La rivero *Gállego* fluas tra mallarĝa intermonto apud Riglos, kaj la homa tekniko profitis la lokon por ŝtopi la intermontan gorgon per digo kun celo akumuli ĉe granda artifika lago la akvon de la rivero, kaj normaligi surverŝadon de la terbienjo. Samtempe la industrio transformas la akvoforton laŭ elektro.

MASARIK

La 7.^{an} de marto, D-ro Masarik festis la 80-jaran datrevenon de sia naskiĝo. Pri ĉi tiu grandanima pioniro de la bohema naciĉestariĝo, D-ro. Jan Herben verkis tre interesan biografion, kiun eldonis niaj moraviaj samideanoj. Per ĉi tiu rimarkinda libro, edifanta libro, vidiĝas Masarik filo de malriĉulo servanta, kiel veturigisto kaj kiel laboristinspektisto, en bieno de la aŭstria imperiestroj; la infano vidiĝas talenta, grandanima, obstina al studo kaj al celo por memperfektiĝo kaj pliboniĝo, entuzias me fervora sindonemulo al humiluloj kaj subpremitoj; la knabo kaj poste junulo pli kaj pli avidas scion, ĉiajn energiojn al ĉiuj similuloj, spertinte pro metioj, laboroj, servoj kaj studoj de li entreprenitaj en kontakto kun ĉiaj malfacilaĵoj. Lia animo fortiĝis pli kaj pli, kaj li sukcesis, kiel profesoro de la ĉeĥa universitato de Praha, starigi novajn instrumentadojn, interesiĝi junulojn kaj maljunulojn, studentojn eĉ profesorojn, karierulojn kaj laboristojn, kaj inokuli al ĉiuj la ardon sian, farigante nediskutebla pioniro de nova ĉeĥa movado, en kiu optimismo pri la estonteco anstataŭis pesimismon, en kiu ĉiuj imitis la majstron kaj laboradis al la efektivigo de la optimismo sub gvidado lia. Ju pli la tempo pasis, des pli optimisto montriĝis Masarik, des pli laborema, des pli entuziasma, dediĉante sin tutplene al la sen-

dependigo de Ĉeĥoslovakujo; kiam eksplodis la tutmonda milito, li estis konstanta aganto, ĉu diplomate, ĉu organizante la ĉeĥan armeon, kaj kiam lia optimismo efektiviĝas, kiam li fariĝas la unua prezidanto de la ĉeĥoslovaka respubliko, je la unuaj tagoj energie li sin dediĉis eviti malhumanan venĝeman agadon kontraŭ la germanaj loĝantoj. Li ankaŭ sin deklaris kontraŭa al interveno kontraŭ la bolŝevika rusa ŝtato.

Amo kaj laboro estas la konstanta devizo de la eminenta filozofo Masarik, kiu ne sin okupis pri metafizikaj aferoj, sed pri praktika filozofio laŭ postuloj urĝaj de la ĉiutaga vivo; tial la celo de la filozofo estis kaj estas homo, familio, popolo kaj homaro per amo, scio kaj laboro, ĉar ĉi tiu triunuo faras homojn, iliajn karakterojn, iliajn firmajn memstarojn, kaj por ĉi tio Masarik sin inspiris per la religiaj, politikaj, moralaj principoj de la ĉeĥa estinteco adaptataj al la vivo aktuala por havigi al sia popolo la firman vojon al certa progreso kaj plej feliĉa estonteco. Li verkis gravajn librojn.

La hispana esperantistaro kore frate salutas la grandaniman homamanton Masarik!

ACTA XIX

En Madrid, a 1.^o de Octubre de 1929, en el domicilio particular del Secretario de la Sociedad Española Esperantista, Abascal, 13, se reunió el Comité Directivo de la misma para tratar asuntos corrientes y revisar las Actas y el Protocolo del Congreso de Oviedo, y, después de un cambio de opiniones sobre el notable progreso de la Sociedad, se procedió a tratar de los asuntos siguientes: se aprobó el Acta de la sesión anterior; se designaron las personas que habían de representar a los *samideanos* de las regiones que no los tenían (León, Murcia, Extremadura, Castilla la Vieja y Navarra); se acordó distribuir la subvención del Gobierno en conformidad con lo ordenado en el Congreso de Oviedo; se decidió mantener la cuota de miembro, de dos pesetas, que marca el Reglamento, no obstante la IX.^a decisión del Congreso de Oviedo; se tomó nota de que los señores Inglada y Herrera, habían sido designados en

el Congreso de Oviedo 1.º y 2.º Vicepresidentes, respectivamente, de H. E. A., y se consideró la dimisión que el Secretario de la Sociedad había presentado ante los Vocales regionales de la Directiva, y, no habiendo tiempo para tratar los asuntos restantes, se acordó levantar la sesión, sin escribir el Acta, hasta que se resolviese sobre los demás asuntos. El día 25 de Febrero de 1930 se reunió el mismo Comité en el mismo domicilio, no habiendo podido reunirse antes por las excepcionales circunstancias que atravesaron algunos de sus miembros, y que quedan aclaradas en una nota que se publicará en HISPANA ESPERANTO; se cambiaron algunas palabras sobre la sorprendente y progresiva marcha de nuestra Sociedad, a pesar del marcado empeño que ponen algunos *samideanos* en desentonar la armonía que debe reinar en el campo esperantista, y se procedió a examinar los puntos pendientes: se convino en notificar los acuerdos del Congreso de Oviedo por medio de la revista HISPANA ESPERANTO a todos los *samideanos*, en conformidad con el art. 5.º de nuestros Estatutos; se insistió en preguntar a los *samideanos* de Barcelona si estaban dispuestos a celebrar el próximo Congreso Nacional de Esperanto en la capital del Principado, fijándoles un tiempo prudencial de quince días para su respuesta, notificándoles que, en caso de no responder, se ofrecería la celebración del Congreso a los *samideanos* de Zaragoza, en conformidad con lo manifestado en el Congreso de Oviedo; se resolvió que, vista la insistencia del señor Maynar en que se cite a todos los Vocales regionales para que asistan a las reuniones de la Directiva, en lo sucesivo se les invitará por medio de la revista siempre que se haya de tratar algún asunto de gran interés para la Sociedad; se aprobó la Memoria que se ha de presentar al señor Ministro de Instrucción Pública sobre el estado floreciente de nuestra Sociedad, desarrollo del plan para el año próximo y petición de apoyo oficial para cumplimentar con éxito nuestros Estatutos, y, no habiendo más tiempo para considerar otros asuntos que pudieran haberse tratado, se levantó la sesión a las veintiuna.

El Secretario,

Mariano Mojado.

PRI «LA KAZOJ KAJ LA PROPOZICIOJ»

DE

EDUARDO BENOT

(*Daŭrigo.*)

VI.^a LECIONO

PRI LA NOMINATIVO.

(*Daŭrigo de la I.^a Leciono.*)

La agoj de *aganto* povas esti okazintaj dum *pasinta tempo*, aŭ povas okazi dum *venonta tempo*, sed la tempaj cirkonstancoj neniel influas la koncepton nominativan (la Nominativon). Same oni devas konscii pri la ceteraj *kazoj*: la tempo ne influas ilin.

Johano kuris.

ĜKiu estas *tiu*, kiu kuris? — Johano. — Do, *Johano* estas Nominativo.

La virino piediros.

ĜKiu estas *tiu*, kiu piediros? — La virino. — Do, *la virino* estas Nominativo.

Fojojn la Nominativo estas nekonata aganto, kaj tiam oni uzas la vortojn *iu*, *iu*, *neniu...*, kaj por demandi, *ĉkiu...*?

Iu estas rompinta ĉi tion.

ĜKiu estas *tiu*, kiu estas rompinta? — Iu. — Oni ne scias precize, kiu tion estas rompinta; sed jes, ke *iu* estis; do, la Nominativo estas *iu*.

ĜKiu venis? — Neniu venis.

Kiu ĉe la demando reprezentas la personon, kiun oni supozis veninta; kaj *neniu* ĉe la respondo eksigas tutan personon venintan; do, *kiu* kaj *neniu* estas, respektive, Nominativoj.

Multfoje la Nominativo de propozicio estas vorto esprimata de alia antaŭa propozicio kaj supozata de tiu pri kiu oni traktas:

DE «LOS CASOS Y LAS ORACIONES»

DE

EDUARDO BENOT

(Continuación.)

LECCIÓN VI.

DEL NOMINATIVO.

(Continuación de la Lección I.)

Los actos de un *agente* pueden haber ocurrido en *tiempo pasado*, o bien pueden ocurrir en *tiempo futuro*, sin que estas circunstancias del tiempo influyan en la noción de Nominativo. Lo mismo debe entenderse acerca de los demás *casos*: el tiempo no influye en ellos.

Juan corrió.

¿Quién es *quien* corrió? —Juan. —Luego *Juan* es el Nominativo.

La mujer andará.

¿Quién es *la que* andará? —La mujer. —Luego *la mujer* es Nominativo.

A veces el Nominativo es un agente desconocido, y entonces se usan las palabras *alguien*, *alguno*, *nadie...*; y para preguntar, *¿quién...?*

Alguien ha roto esto.

¿Quién es *quien* ha roto? —Alguien. —No se sabe precisamente quién lo ha roto; pero sí que *alguien* ha sido; luego el Nominativo es *alguien*.

¿Quién vino? —Nadie vino.

Quién en la pregunta representa a la persona de quien se creía que vino; y *nadie* en la respuesta excluye a toda persona que pudiera haber venido; luego *quién* y *nadie* son, respectivamente, Nominativos.

El Nominativo de una cláusula es muchas veces una palabra expresada en otra cláusula anterior y sobrentendida en la de que se trate:

Ĉu manĝas Johano? — Manĝas.

Kiu estas la Nominativo de la demando kaj kiu estas tiu de la respondo? — *Johano*. — Ĉu estas esprimata en ambaŭ propozicioj la Nominativo Johano? — Ne: en la respondo estas silentata kaj supozata. Kio ĝin indikas? — La senco de la vortoj.

Alifoje Nominativo izolita reprezentas tutan propozicion, kies elementoj estas en alia antaŭa propozicio:

Kiu venis? — Neniu.

Neniu, Nominativo de la respondo, reprezentas la kompletan propozicion *neniu venis*.

Kiu estas portinta la korbon de la viando al la ĝardeno? — La servistino.

Ĉi tie *la servistino* (Nom.) reprezentas la kompletan propozicion *la servistino estas portinta la korbon* (Ac.) *de la viando* (Gen.) *al la ĝardeno* (Abl.).

Laste, la ideon pri *aganto* oni ne devas konscii tiel mallarge ke ĝi ĉiam esprimu ideon pri *persono* (aŭ almenaŭ, pri vivanta estaĵo). Materia objekto povas esti Nominativo:

La muelejo funkcias.

Kiu estas la Nominativo? — *La muelejo*. — Kial? — Ĉar ĝi estas *tiu k u funkcias*.

La vento muĝegas kaj la maro blekegas.

Kiuj estas la Nominativoj? — *La vento; la maro*.

La inkujo ne enhavas inkon.

Kiu ne enhavas? — *La inkujo*. — Do, *la inkujo* estas la Nominativo.

Diru disĉiplo la kazojn, kiujn koncernas la vortoj de la sekvantaj propozicioj.

VI^a TEMO.

La ĉevalo *saltis*. — La hundo *kuris*. — La lupoj *blekos* ĉi tiun nokton (Abl.) ĉe la arbaro (Abl.). — La birdo *flugis* super la arbojn (Abl.) kiun ni alnomas esperante akuzativo de direkto. La hundoj *mordis* la infanon ĉe la maroj (Abl.) kaj ĉe la kruroj

¿Come Juan? — Come.

¿Cuál es el Nominativo de la pregunta y cuál es el de la respuesta? — Juan. — ¿Está en ambas cláusulas expreso el Nominativo Juan? — No: en la respuesta está callado y sobrentendido. — ¿Quién lo indica? — El sentido de las palabras.

Otras veces un Nominativo aislado representa una cláusula entera cuyos elementos se encuentran en otra cláusula anterior:

¿Quién vino? — Nadie.

Nadie, Nominativo de la respuesta, representa la cláusula entera *nadie vino*.

¿Quién ha llevado el cesto de la carne al jardín? — La criada.

Aquí *la criada* (Nom.) representa la cláusula entera *la criada ha llevado el cesto* (Ac.) *de la carne* (Gen.) *al jardín* (Abl.).

Por último, la idea de *agente* no ha de entenderse de un modo tan estrecho que equivalga en todo caso a la de *persona* (o, por lo menos, a la de ser animado). Un objeto material puede ser Nominativo:

El molino anda.

¿Cuál es el Nominativo? — *El molino*. — ¿Por qué? — Porque es *quien anda*.

El viento brama y el mar ruge.

¿Cuáles son los Nominativos? — *El viento; el mar*.

El tintero no tiene tinta.

¿Quién no tiene? — El tintero. — Luego *el tintero* es el Nominativo.

Diga el discípulo en qué casos están las palabras de las cláusulas siguientes:

TEMA VII.

El caballo *saltaba*. — El perro *corría*. — Los lobos *aullarán* esta noche (Abl.) en el monte (Abl.). — El pájaro *voló* por lo alto (Abl.) de los árboles. — Los perros *mordieron* al niño en las manos (Abl.) y en las piernas (Abl.) cerca del estanque (Abl.).

(Abl.) apud la akvujo (Abl.).—La masonisto *donis* la brikojn al la masonlernanto per la korbo de la ĉarpentisto.—Kiu *estas veninta?*—Iu estas veninta—Kiu (Nom.) *estas frapinta* ĉe la pardo (Abl.) per bastono (Abl.)?—Neniu.—La vento *muĝas tra la kameno* (Abl.).—Ĉi tiun vesperon (Abl.) *alvenos* la velŝipo trenite de la vaporŝipo.

Faru la Profesoro demandojn kiel oni faris en la antaŭaj lecionoj.

VII.^a LECIONO.

PRI LA NOMINATIVO.

(*Daŭrigo de la I.^a kaj VI.^a Lecionoj.*)

En la unuaj kaj duaj personoj de la verboj hispanaj iras la Nominativo (la plimulto el la fojoj) entenata en la verba finaĵo.

(*Ci*) *skribas*.

Kiu estas *tiu, kiu* skribas? —Ci. —Kaj kial oni konas tiun *ĉi*? —Tial ke la verbo (*oni koncernas ĉiam la hispanan lingvon*) finiĝas per *s*. —Do, kio estas *skribas*? —Verbo kaj Nominativo.

(*Ci*) *piediros*.

Kiu estas *tiu, kiu* piediros? —Ci. —Kiu estas, do, la Nominativo? —*Ci*. —Kaj kiel oni konas tiun nominativon? —Ĉar la verbo finiĝas per *s*. —Kiu estas, do, *piediros*? —Verbo kaj Nominativo.

(*Ni*) *piediras*.

Kio estas *piediras*? —Verbo kaj Nominativo. —Kiu estas la Nominativo? —*Ni*. —Kiel oni konas, ke la Nominativo estas *ni*? —Per la finaĵo *mos*. —Ĉu estas esprimata la Nominativo *ni*? —Jes: per la finaĵo *mos*.

(*Mi*) *lernas*.

Kio estas *lernas*? —Verbo kaj Nominativo. —Kiu estas la Nominativo? —*Mi*. —Kiel oni konas, ke la Nominativo estas *mi*? —Ĉar la verbo finiĝas per *o* ne akcentigata. —Ĉu estas esprimata la Nominativo *mi*? —Jes: per la finaĵo *o*.

El albañil *dió* los ladrillos al peón en la espuerta del carpintero. ¿Quién *ha venido*? —Alguien *ha venido*. —¿Quién (Nom.) *ha llamado a la puerta* (Abl.) *con un bastón* (Abl.)? —Nadie. — El viento *brama* en la chimenea (Abl.).—Esta tarde (Abl.) *llegará* el bergantín a remolque del vapor.

Haga el Maestro preguntas como en las lecciones anteriores.

LECCIÓN VII.

DEL NOMINATIVO.

(Continuación de las lecciones I y VI.)

En las primeras y segundas personas de los verbos españoles va el Nominativo (la mayor parte de las veces) embebido en la terminación verbal.

Escribes.

¿Quién es *quien* escribe? —Tú. —Y ¿en qué se conoce ese *tú*? —En que el verbo acaba en *s*. —Luego ¿qué es *escribes*? Verbo y Nominativo.

Caminarás.

¿Quién es *el que* caminará? —Tú. —¿Cuál es, pues, el Nominativo? —*Tú*. —Y ¿en qué se conoce ese Nominativo? —En que el verbo acaba en *s*. —¿Qué es, pues, *caminarás*? —Verbo y Nominativo.

Caminamos.

¿Qué es *caminamos*? —Verbo y Nominativo. —¿Cuál es el Nominativo? —*Nosotros*. —¿En qué se conoce que el Nominativo es nosotros? —En la terminación *mos*. —¿Está expreso el Nominativo nosotros? —Sí: en la terminación *mos*.

Aprendo.

¿Qué es *aprendo*? —Verbo y Nominativo. —¿Cuál es el Nominativo? —*Yo*. —Y ¿en qué se conoce que el Nominativo es *yo*? En que el verbo acaba en *o* no acentuada. —¿Está expreso el Nominativo *yo*? —Sí: en la *o* terminal.

(Mi) *eniris*.

Kio estas *eniris*? —Verbo kaj Nominativo *mi*. —Kiel oni konas, ke la Nominativo estas *mi*? —Per la akcentigita finaĵo *e*. Ĉi tiu (hispana) klaso el Nominativoj entenataj en la verbal finaĵoj estas nomata *finaĵa Nominativo*.

Diru nun kiuj estas la Nominativoj kaj ĉu ili estas *finaĵaj*.
Diru poste la ceterajn kazojn.

VII.^a TEMO.

(Mi) *manĝos* (Verb. kaj Nom.) la panon (Ac.) de la panvendistino (Gen.) je la nokto (Abl.) en la kuirejo (Abl.). —(Mi) *legos* la «Gazeton» je la vespero ĉe la ĝardeno. —(Mi) *skribis* artikolon tiun ĉi matenon en la redaktejo de la ĵurnalo. —(Mi) *rakontis* tiun historion. —(Ni) *tranĉis* la plumojn. —(Ni) *tranĉis* la panon. —(Mi) ricevas la monon. —(Ci) *pruntedonas* miajn librojn. (Mi) *donacis* kukon. —(Mi) *pruntedonos* la monon. —Kiu *venis*? (Kiu estas la N.?). —*Neniu* (Nom.). —Ĉu *venis* iu? —Iu (Nom.) *venis*.

Faru proprajn ekzemplojn la lernanto.

(Daŭrigota.)

A LOS MIEMBROS DE H. E. A.

Los miembros aragoneses de Hispana Esperanto-Asocio, con arreglo al artículo 3.º de nuestros vigentes Estatutos, en virtud de candidatura presentada por el grupo «Zaragoza Esperantista», y a fin de designarse ellos mismos sus Vocales regionales, como dicho artículo dispone, y puesto que los Vocales que hasta la elección han figurado como tales lo fueron por designación de la parte central del Comité Directivo al fundar la Asociación, acaban de elegir a D. José Carnicer Ibáñez (Manuela Sánchez, 17, Zaragoza) y a D. Félix Sisón Urgell (Agustina de Aragón, 9, Zaragoza), por lo que han sido incorporados

Entré.

¿Qué es entré? —Verbo y Nominativo *yo*. —¿En qué se conoce que el Nominativo es *yo*? —En la *é* acentuada final.

Esta clase de Nominativos embebidos en la terminación del verbo se llaman *Nominativos Desinenciales*.

Dígame ahora cuáles son los Nominativos y si son *desinenciales*.

Díganse luego los demás casos.

TEMA VII.

Comeré (V. y N.) el pan (Ac.) de la panadería (Gen.) a la noche (Abl.) en la cocina (Abl.).—*Leeré* la «Gaceta» a la tarde en el jardín.—*Escribí* un artículo esta mañana en la redacción del periódico.—*Referí* esa historia.—*Cortamos* las plumas.—*Cortamos* el pan.—*Recibo* el dinero.—*Prestas* mis libros.—*Regalé* una torta.—*Comeré* el pan.—*Prestaré* el dinero.—¿Quién *vino*? (*quién* es el N.).—*Nadie* (Nom.).—¿*Vino* alguien? —Alguien (Nom.) *vino*.

Ponga ejemplos de su invención el alumno.

(Continuará.)

a la Directiva como Vocales de Aragón; y así se hace constar para conocimiento de todos los miembros de H. E. A. a los efectos consiguientes.

Dado el acuerdo tomado con anterioridad, y ya publicado en esta revista, se invita a todos los Vocales regionales de la Directiva para la reunión que celebrará el día 27 del mes de Mayo inmediato en el domicilio social (Sagasta, 10, Cruz Roja), de siete a ocho de la tarde.


V.º B.º

El Presidente Accidental,

José Perogordo.

El Secretario de H. E. A.,

Mariano Mojado.



Artifika lago de la Ŝtonego. Akvofalo (Huesca).

RECENZEJO

«*Gemoj de la hungara popolmuziko*» estas aĉetinda kolekto el kvin interesaj popolkantoj kun teksto por la kanto kaj fortepiano. Bone ĝi taŭgas por propagandi esperanton. Prezo: 2 pengoj aŭ egalvaloro. Mendu ĉe: D-ro Julio Lukács. VII., Pillangó-utca, 13. - Budapest (Hungarujo).

«*Bela Joe*» de la tutmondfama verkistino Marshall Saunders, tradukita el la angla lingvo esperanten de J. Blaikie kaj N. Hohlov, 18 × 12 1/2 cm., 310 paĝa, bele ilustrita, de D. Copeland estas kvazaŭ aŭtobiografio de hundo per kiu ĉi tiu parolas al ni de altmorala vidpunkto pri amo al bestoj, de bestoj al homoj, de homo al homo, laŭ interesaj realaj scenoj kun tre flua, klasika kaj simpla lingvo de Zamenhof. La verko estas alloga kaj aĉetinda.

«*La Dormanto Vekiĝas*» de la eminentega kaj famega H. G. Wells, tradukita de A. Frank Milward, 18 × 12 1/2 cm., 210 paĝa. Fidela traduko el la angla lingvo al Esperanto, laŭ ankaŭ flua simpla stilo de la zamenhofa klasika tempo. Pri la verko la recenzisto diras same, kiel antaŭe: la samideanaro havigos al si kun «*Bela Joe*», du juvelojn de nia literaturo.

Mendu ilin ĉe: Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, W. C. 2. - London.

«*Kaŭdido*» aŭ «*La Optimismo*», de Voltaire, tradukita esperanten de E. Lanti el la franca lingvo, 19 × 13 cm., 160 paĝa. Mirinde la tradukinto riĉigis la esperantan literaturon per sia tradukaĵo, kies ilustroj ankaŭ estas rimarkinda laboro de R. Bartelmes. S-ro Lanti same, kiel la antaŭe cititaj tradukistoj klasike, simple, flue, uzis la lingvon por transdoni al ni la faman verkon.

«*Jubilea Kolekto de Originalaj Poemoj*», de Eŭgeno Miĥalski, 15 × 12 cm., 62 paĝa. Malfermas la verkon poemo «*Enkonduko*», en kiu interese, genie, la poeto ludas la finaĵojn «*as*», «*is*», «*os*», por liveri al ni belegan versaĵon. La kolekto konsistas el 15 poemoj kaj unu prozaĵo enkonduko al Ciklo de Poemoj (kvar), kaj vidigas klare genian inspiron kaj facilan versaradon de la aŭtoro kiu bone scias trafi la rimon.

Same ĉi tiun verkon kiel la antaŭan eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, kaj ilin mendu ĉe: Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanujo).

«*Migranta Plumo*», de Julio Baghy, 16 × por 12 cm., 158 paĝa, eldonita de Hungarlanda Esperanto Societo (Budapest); 3'10 sv. fr., luksa eldono 5'20 sv. fr. Teatraĵetoj, noveletoj kaj poemoj, pleninteresaj, belaj, mirinde verkitaj, formante kolekton, kiun ĝuste oni povas aljuĝi vera juvelo de nia literaturo, estas la riĉa enhavo de la libro.

«*Belga Antologio*» konsistas el du grandformataj volumoj, unu por la flandra parto kaj alia por la franca, kun 285 paĝoj po volumo, eldonita de Belga Esperanto Instituto (Kleine Hondstraat, 11. - Anteverpeno, kies prezo estas 6 sv. fr. por ambaŭ volumoj kune, ĉar oni ne vendas aparte la du librojn. Kompilis ilin respektive la tre kompetentaj samideanoj H. Vermuyten kaj M. Jaumotte, donante, ĉe la komenco de sia respektiva kompilitaĵo ĉiu el ili, tre bonegan resumon pri historio de la literaturo de unu kaj alia lingvoj. Ĉi tiu mirinda verko devas aperi ĉe ĉiuj bibliotekoj de grupoj kaj societoj, kaj ĝi, kun aliaj similaj, estos unu el plej efikaj propagandiloj de esperanto, ĉar bonege elpruas taŭgecon de nia lingvo. Ĉiuj partoprenintoj de la 20.^a Universala Kongreso de Antverpeno donace ĝin ricevis.

«*Bibliografio de Internacia Lingvo*», kompilita kaj komentariita de nia tre klera kaj kompetenta samideano, licencito en sciencoj, s-ro P. E. Stojan, grandformata volumo el 560 paĝoj, kies prezo estas 12'50 sv. fr., eldonita de Universala Esperanto Asocio (Genève. 1, Tour de l' Ile). De ĉiuj vidpunktoj miriganta verko estas ĉi tiu Bibliografio, ĉar ĝi liveras al esperantisto ĉion necesan por fariĝi pli kaj pli profunde, entuziasme nelacigebla kavaliro de la verda stelo; foliumante la grandiozan verkon, ĉiu havigos al si materialon fruktodonan al venko. Ĉi tiu verko faros al nia afero grandegan servon.

«*Esperanto-Puroladoj de D-ro L. L. Zamenhof faritaj ĉe la malfermo de universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-1912*», estas verko eldonita de D-ro Emil Pfeffer, gazetara gvidanto de Aŭstria Esperanto-Delegitaro, 19 × 12 cm., kun 168 paĝoj. D-ro Pfeffer aldonis je la komenco enkondukon pri programo kaj deveno de l'esperantismo, la germanan tradukon kaj rimarkojn kaj la tekstoj aperas esperante sur la paraj paĝoj kaj germane sur la neparaj. Imitinda estas la laboro de D-ro Pfeffer koncerne ceterajn naciajn lingvojn. (Tagblatt-Biblioteko, Steyermühl-Eldonejo. - Vieno I, Wollzeile, 20.)

«Sivaĝi» estas verketo de nova hinda esperantisto, kiu, vizitante svedujon, konatiĝis hazarde kun nia lingvo kaj rapide ĝin lernis sendube por ĝin utiligi je la bono de Hindujo; tial Laksmishwar Sinha, helpate de svedaj samideanoj kaj de la Eldona Societo-Esperanto (Stockholm), verkis kaj eldonis la drameton tiel titolitan kaj, per facila lingvo, li prezentas al ni scenojn de la hinda historio okazintajn kiam pro milito inter hindaj reĝoj, kaŭze de ambicio de unu el ili helpata de fremdaj komercistoj, ĉi iuj fariĝas la mastroj de la lando. La verko estas $19\frac{1}{2} \times 13$ cm., 68 p. Iuj eraroj vidiĝas: *ilia* anstataŭ *sia* k. c.

Rimarko. La eldonistojn de la antaŭaj verkoj atentigas la Redakcio, ĉar ili nur sendis UNU specimenon. Ĉiu *recenzo postulas duoblan specimenon de verko.*

«*La esenco de l' Bahaismo*», de D-ro. Hermann Grossmann (esperantigita de H. Greff), kaj «*Bahaismo kaj Politiko*», de D ro. Ernst Kliemke (†), prezidinto de la Germana Esp.-Asocio, eldonitaj de Bahaa Esperanto Eldonejo (*Wandsbek.* - Germanujo. Poŝtfako, 8.), estas du broŝuroj, $23 \times 15\frac{1}{2}$ cm., 8 p., tre interesaj por propagandi tiun ĉi simpatian spiritmovadon, kiu alkonformiĝas tute ĝuste al moderna stato de la vivo, al nuntempaj postuloj de la vivo. Prezo: 0'25 el gmk. Aĉetindaj estas ĉi tiuj broŝuroj, ĉar ilia enhavo morala, post legado ĉe tute neŭtrala religia vidpunkto, restigos bonan semon en ĉiuj legintoj.

«*Aŭstrio*» estas rimarkinde belega nova gvidfolio ilustrita eldonita de la Ministerio por Komerko kaj Trafiko de Aŭstrio. La esperantan tekston faris nia kompetenta samideano s-ro Steiner, prez. de la Int. Esp.-Muzeo de Wienn. Beligas la gvidfolio kolorigitaj bildoj kaj landkarton. Kontraŭ alsendo de internacia respondkupono al tiu s-ro. (Int.-Esp.-Muz.-Wienn), li sendos unu, tri-kvar gvidfoliojn. Sendante la specimenojn al Turiŝt-oficejoj, al ĵurnaloj, gazetoj, k. t. p., oni vidigos evidente utilon de esperanto.

«*Fabeloj*» estas originala verketo de Franjo Modriĵan, $17\frac{1}{2} \times 11\frac{1}{2}$ cm., 32 p.; per kiu flue, korekte, ĉarme disvolvas la verkistino sonĝon de naiva bonkora dektrijara knabino. Prezo: 2 fr. fr. Eldonita de «*Espero Katoliko*», 22 Cours Albert I.^{er}. — Parĭs. - VIII.

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO gravege progresas kaj plenumas la rolon por la disvastigo de Esperanto en la tuta lando; tial estas devo de Esperantisto aliĝi al ĝi kaj varbi por ĝi novajn adeptojn. La kotizo estas DU pesetoj (unua kotizo 2,50 pro la membrokartoj). Sendu la kotizon al la sekretario, S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid. Se vi sendus samtempe TRI pliajn pesetojn por subteni la propagandon per ĉi tiu gazeto vi ricevos akurate kaj ĉiumonate ĝin.

Eksterlandanoj, sendintaj KVIN sv. fr., ricevos la gazeton. Ĉiu sendu la monon poŝtĝire al S-ro Mojado kaj enlandanoj povas pagi per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

INTERŜANGO nur po du specimenoj.

Gazeton, presaĵojn, materialon, k. c., sendu al la Redakcio.

Kiu ne volas

malprogresiĝi je la

NOVA TENDENCO

de a tuta mondo

tiu tuj skribu por ekhavi senpagajn speci-
menojn de la

Esperanta monata gazeto

“OOMOTO”

al

OOMOTO PROPAGANDA OFICEJO

Kameoka, Kioto-fu,

Japanujo.

Presejo de «El Financiero», S. A. » Strato de Ibiza, 13 » Madrid